La Nov-Jorkia
# ESPERANTISTO

ISSN 2573-6108

*Esperantumado en la Imperia Ŝtato*

Volumo 1 Numero 2 Novembro 2017



## Renkontiĝoj Rekomenciĝas en Roĉestro

Tomaso Alexander, Esperanto-Klubo de Rocestro




Tomaso Alexander, Jody Benedict, kaj Sam Hobson partoprenas en monata renkontiĝo de la Esperanto-Klubo de Roĉestro (foto de Timoteo Boronczyk).

Esperanto en Roĉestro havas longan historion (de almenaŭ 1946) sed lastatempe la lokaj samideanoj estis nur neregule aktivaj. Ni renkontiĝis nur de tempo al tempo—ekzemple, dum la Senkrokodila Semajnfino en januaro 2016, aŭ dum neformala tagmanĝo kun Tomaso kaj Dejlo, aŭ kiam venas gasto per la Pasporta Servo.

Ekde aŭgusto refoje okazas monataj renkontiĝoj en Roĉestro. Ĉiun monaton la renkontiĝo estas pli bona. Ĝis nun partoprenas 4-6 personoj (sep diversaj personoj entute) kaj ĝi estas bona miksaĵo de novuloj kaj malnovaj amikoj.

Komence mi simple anoncis la renkontiĝon per la retpoŝtlisto de la Esperanto-Klubo de Roĉestro, sed ekde septembro ni krome estas "Duolingo Event" kaj Duolingo helpas al ni reklami niajn kunvenojn al novaj lernantoj. La partoprenantoj kaj interesitoj trovas nin divers-maniere. Unu ja aŭdis pri ni per Duolingo. Alia per Facebook. Alia per Amikumu. Kelkaj aliĝis al la retpoŝt-listo antaŭ kelka tempo, kaj kelkajn ni konas jam de jaroj. Mi esperas ke tio signifas ke ni estas troveblaj.

Ĝis nun ni renkontiĝas en la sama kafejo sed multaj partoprenantoj kaj interesitoj estas studentoj ĉe RIT kaj eble trovos lokon oportunan por ili.

Niaj renkontiĝoj okazas ĉe Starbucks (100 Center Place Drive) ĉe Ridge Road kaj ŝoseo 390. Kutime ni babilas pri plej diversaj temoj dum duono de la tempo, kaj dum la alia duono ni faras paroligan aktivaĵon depende de la nivelo de la partoprenantoj.

# Kolofono

*La Nov-Jorkia Esperantisto* raportas po du fojoj jare pri esperantaj eventoj kaj agadoj, kiuj okazas en la ŝtato Nov-Jorkio. Eldonas la gazeton la Esperanto Societo de Sirakuso.

**Redakcio**
Timothy Boronczyk
Zerbie Hynson

Ne nepre kongruas la opinio de la societo kaj la enhavo de artikoloj. Sendu komentojn kaj proponojn retpoŝte al la redakcia teamo ĉe *novjorkio@syracuseesperanto.org.*

Aktuala kaj malaktualaj numeroj estas haveblaj senpage ĉe *syracuseesperanto.org/novjorkio.*


La kolofona bildo de la unua paĝo montras la Kastelon Boldt, grava vidindaĵo en la regiono Mil Insuloj. Usona riĉulo George Boldt komencis konstruadon de la kastelo kiel privata domego en 1900, sed subite ĉesigis tion post la morto de lia edzino en 1904. Boldt lasis la kastelon kiel monumenton je amo kaj neniam revenis al la kastelo. Nun ĝi estas konservata kiel turista altiraĵo.



Neil Blonstein, Sara Spanò, Ulrich Lins, kaj Humphrey Tonkin en la Esperanto-Novjorko Oficejo apud UNO meze de sam-loka prelegaro (foto de Neil Blonstein).

# Serio de Prelegoj en Novjorko

Raúl García, Esperanto-Societo de Novjorko

Okazis serio de prelegoj honore al Tivadar Soros. La serio okazis danke al subvencio de Esperantic Studies Foundation, kaj subteno kaj gastigo de City University of New York. La serio estis enkondukita de Humphrey Tonkin je la 16a de decembro 2016, kiam prelegis ankaŭ Esther Schor pri sia libro *Bridge of Words*.

Tra 2017 okazis kelkaj aliaj interesaj prelegoj en la serio. En februaro prof. Michael Gordin prelegis pri Max Talmey kaj lia artefarita lingvo Gloro, kaj ankaŭ pri iom de la historio de interlingvistiko. En marto prezentis prof. Brigid O'Keeffe pri la historio de Esperanto en la Sovetunio kaj ties iugrada subteno de Esperanto dum la 1920aj jaroj.

Ulrich Lins parolis en majo pri la persekutado kiun esperantistoj spertis fare de registaroj mal-toleremaj al Esperanto, temo de sia libro *La Danĝera Lingvo*. En oktobro prof. Nico Israel prezentis interesan analizon de eroj de la verkoj de James Joyce, *Ulysses* kaj *Finnegans Wake*, kie troviĝas Esperanto en rektaj kaj nerektaj manieroj.

La lasta prelego de la serio okazis la 10an de novembro, kiam Ulrich Becker prelegis pri la kulturo de Esperanto kaj kulturaĵoj kreitaj de Esperantistoj. Malgraŭ kutimaj diraĵoj, ke planitaj lingvoj ne kapablas esti utilaj por kulturaj celoj, la historio de Esperanto ĝis nun diras alie.

# Nova Grupo en Platsburgo

T. Roberto LYMAN, Esperanto-Asocio de Platsburgo



T. Roberto LYMAN estas la fondinto de la Esperanto-Asocio de Platsburgo (foto de T. Roberto LYMAN).

La esperantaj grupoj en la ŝtato kune laboras por prezenti Esperanton al la loĝantaro de Nov-Jorkio. Kaj nun estas nova grupo en Nov-Jorkio, la Esperanto-Asocio de Platsburgo.

Nia unua kunveno okazis je la 6-a de oktobro ĉe la kafejo Koffee Kat Espresso Bar en Platsburgo, urbo situanta inter la Adirondak-Montaro kaj Vermonto.

Ni renkontiĝos ĉiumonate kaj planos kelkajn amuzajn agadojn, do se vi loĝas proksime, bonvolu partopreni! Venontaj renkontiĝoj estos anoncitaj en nia Facebook paĝo ĉe *facebook.com/pburghesperanto*.

# Lekso: Kartludo pri Ŝanĝiĝantaj Vortoj

Timoteo BORONCZYK, Esperanto-Societo de Sirakuso

Kiel la organizanto de la Esperanto-Societo de Sirakuso, mi ĉiam pensas pri amuzaj projektoj kaj agadoj por la grupo. Unu el miaj lastatempaj projektoj estas kartludo, kiun mi nomas Lekso. Mi pripensis la regulojn, presigis kartojn, kaj membroj de la grupo provludis ĝin dum nia renkontiĝo. Ĉar eble la projekto estas interesa al la esperanta komunumo, mi priskribas ĝin ĉi tie.

Ludantoj komencas la ludon kun sep kartoj, kiuj montras literon. La celo estas literumi vortojn por kolekti la plej-multon de literaj kartoj. Laŭvice, ĉiu ludanto metas unu el siaj kartoj apud la kartojn, kiuj jam estas surtabligitaj, celante literumi vorton. Ekzemple, karto T estas sur la tablo. La unua ludanto apudmetas karton E, dirante ke li literumas la vorton "tero". La sekva ludanto nun devas literumi alian vorton, kiu komenciĝas per TE. Ŝi metas karton L, dirante ke ŝi literumas la vorton "telefono".

Se ludanto ne povas literumi vorton, la antaŭa ludanto kolektas la metitajn kartojn por poentoj.

Specialaj kartoj ŝanĝas aŭ la vorton aŭ kiel oni ludas dum sia vico:

- "Ajna litero" povas reprezenti ajnan literon, kiun la ludanto volas.
- "Aldoni supersignon" kaj "forigi supersignon" ŝanĝas la elektitan literon al/de ĝia supersignita formo.
- "Anstataŭigi" ŝanĝas unu literon al alia.
- "Meti komence" permesas, ke la ludanto metas sian karton antaŭ la komencon de la vorto.

La ludo finiĝas kiam ĉiuj ne plu povas literumi. La ludantoj kalkulas siajn prenitajn literkartojn kaj tiu, kiu kaptis la plejmulton de literoj, gajnas la ludon.



Timoteo BORONCZYK, Ken HYNSON, Aaliyah MONTALVO, kaj Zerbie HYNSON de Sirakuso ludas Lekson (foto de Timoteo BORONCZYK).

Oni povas fari facile kaj malmultekoste propran version de la ludo per tranĉita kartona papero kaj feltokrajono. Se vi preferas mendi profesian presitan version, kontaktu min retpoŝte ĉe *tboronczyk@gmail.com*.





# Gratulon al KER-Ekzameniĝintoj

Timoteo BORONCZYK, Esperanto-Societo de Sirakuso

Gratulon al ĉiuj esperantistoj, kiuj trapasis la KER-ekzamenon dum NASK kaj dum la Landa Kongreso en Raleigh, Norda Karolino, kaj speciale al la ekzameniĝintoj de Nov-Jorkio:

- Tomaso ALEXANDER, Roĉestro – C1
- Raúl GARCÍA, Novjorko – C1
- Humphrey TONKIN, Novjorko – C1

La nivelo C1 indikas, ke la ekzamenanto kapablas uzi la lingvon diversmaniere kaj efike por sociaj, studaj, kaj profesiaj celoj. C1 estas la plej alta nivela en kiu oni povas ekzameniĝi esperante.

# Kluboj

**Esperanto-Societo de Novjorko**
*esperanto-nyc.org*
estro Miko BRANDINI
*esperantosocietyofnewyork@gmail.com*

**Esperanto-Asocio de Platsburgo**
*facebook.com/pburghesperanto*
estro T. Roberto LYMAN
*pburghesperanto@gmail.com*

**Esperanto-Klubo de Roĉestro**
*groups.yahoo.com/Esperanto Rochester*
estro Tomaso ALEXANDER
*salivanto@yahoo.com*

**Esperanto-Societo de Sirakuso**
*syracuseesperanto.org*
estro Timoteo BORONCZYK
*mail@syracuseesperanto.org*

Se ne estas grupo en via regiono, starigu iun kaj sciigu nin. Ni nepre listigos ĝin ĉi tie.

# Kalendaro

**Komencanta konversacia renkontiĝo de la Esperanto-Societo de Novjorko** okazas ĉiumonate ĉe Espresso 77. Datoj estas anoncotaj. *meetup.com/EsperantoSocietyOf NewYork*

**Formala renkontiĝo de la Esperanto-Societo de Novjorko** okazas ĉiumonate la trian vendredon (krom somere) ĉe Community Church of New York. *meetup.com/Esperanto SocietyOfNewYork*

**Renkontiĝo de la Esperanto-Asocio de Platsburgo** okazas ĉe Koffee Kat Espresso Bar. Datoj estas anoncotaj. *facebook.com/pburghesperanto*

**Renkontiĝo de la Esperanto-Klubo de Roĉestro** okazas ĉiumonate la lastan merkedon ĉe Starbucks ĉe Center Pl Dr. *events.duolingo.com/rochester-esperanto*

**Renkontiĝo de la Esperanto-Societo de Sirakuso** okazas ĉiumonate la trian vendron ĉe Strong Hearts Cafe. *meetup.com/SyracuseEsperanto*

**Zamenhof Tago** okazos la 15an de decembro (kelkaj grupoj gastigos siajn proprajn festojn).

**Semajnfina Lingvokurso** okazos la 10an kaj 11an de marto en Sirakuso. *facebook.com/events/386867875066229*

**Senkrokodila Semajnfino** okazos la 21an ĝis 22a de aprilo en Utiko. *facebook.com/events/1669721136435260*